4-a Jaro. N-o 205 APERAS  SEMAJNE 6. Septembro 1928

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA


REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanti | SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e | ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerchner

EL LA URBO DE NIA VIII-a

Göteborg aspektas grizkolore, severeme. Grandaj aleoj kun arboj ebligas bonan aerumon de la urbo. Brike flavaj konstruoj kun dube ruĝaj tegmentoj kaj verdaj parkoj rompas la unutonecon de la tuto. Ĉi tie kaj tie montriĝas granitaj rokoj. La urbo staras sur firmega fundamento. La homoj, kiuj vivas en tia kadro, devas esti seriozaj, pensemaj kaj fortvolaj. Ili ankaŭ estas gajaj kaj bonhumoraj. Sed ilia gajemo ne flagras kaj elŝprucas, kiel okazas en sudaj landoj . . .

Tramveturiloj traruliĝas, flirtigante flagetojn, ĉe kiuj vidiĝas verda stelo sur ruĝa fundo. Oni ja scias, ke la urba Konsilantaro estas laborista en sia plimulto: tute normale do okazas tia elmontro de simpatio al nia movado. Bavariaj K-doj en sia nacia kostumo, ruĝfrontbatalantoj en uniformo, promenas tra la stratoj kaj metas eksterordinaran, pitoreskan trajton al la fizionomio de la urbo. Sur granda herbeja placo migruloj starigis tendojn, kaj tio fariĝis multvizitata kuriozaĵo. La gazetaro ŝerce raportas, kiel esperantistoj solvas la loĝejan problemon. Sed nia K-do Neĝam Mohamed el Alĝerio tenas la rekordon inter ĉiuj kongresanoj rilate famecon: li ja estas la ĉasobjekto de ĉiuj fotistoj kaj karikaturistoj . . .

La antaŭ-kongresa manifestacio, organizita sub la respondeco de S v e d a L a b o r i s t a E s p e r a n t o - A s o c i o, estis brile plensukcesa. Pri ĝi raportis detale kun fotoj kaj karikaturoj la plej gravaj gazetoj el Göteborg kaj eĉ el Stokholmo. — 17. 8. 28.



Salonego, kie okazis la manifestacio organizita de SLEA okaze de la VIII-a SAT-kongreso

*

Aliĝis 615 personoj; alvenis 436 el 24 landoj. Tiurilate oni ankaŭ rajtas paroli pri plensukceso.

Miaopinie, nia VIII-a estis sukcesa ne nur je ekstera vidpunkto, sed ankaŭ je la interna — kompare kun la antaŭaj kongresoj. Vigle kaj eĉ kelkfoje pasie oni diskutis pri la ĝenerala gvidado de la Asocio. Pri plej malgrandaj aferoj montriĝis intereso ĉe granda nombro da kongresanoj. Pruvon: unu laborkunsido daŭris ĝis la 23-a horo por diskuti ĉefe pri kotiz- aŭ Jarlibraj aferoj! Ĉeestis tiun noktan kunsidon eble pli ol ducent K-doj.

Cetere, estas ia manko en niaj kongresoj, ke oni tro longe babilas pri bagateloj. Tio ja okazigas, ke ne plu restas sufiĉe da tempo por dece diskuti pri gravaj principaj demandoj. Tiel okazis ĉi-foje rilate al la programprojekto . . .

*

Kiel kutime, konfliktetoj okazis inter diversaj tendencoj, Pri tio estas notinde jena tre karakteriza fakto. En sia finparolo, K-do Adamson, komunistpartiano, eldiris frazon, kiu ŝajnis al K-do Deubler ofenda por la social-demokratoj. Nu, post ambaŭflanka klarigo, kion ni vidis: La du kontraŭuloj premis al si reciproke la manon sur la estrado, ĉe varma aplaŭdado de la ĉeestantaro. Kortuŝa, tre signifa okazintaĵeto, kiu klare montras, ke la SAT-aneca sento superregas la disigajn fortojn en la kadro de nia Asocio.

*

Plej libera diskutado okazis pri la gvidado de SAT. La Estraro povis esti kritikata, ĉiel riproĉata. Kaj tio estas bona. Ĉe la fino, Rezoluci-Komisiono, konsistanta el la Kongres-prezidantaro, Sekretariaro kaj Proponkomisiono, prezentis al la kongresantoj tekston de rezolucio, kiu aprobas la ĝisnunan gvidadon de SAT. Tiu rezolucio estis u n u a n i m e akceptata[1].

[1] Oni legu la tekston sur pĝ. 396 kaj 397.

Okazis interkonsento inter la rajtigitaj reprezentantoj de 7 Lab. Esp. Asocioj kaj la reprezentanto de SAT.

Ĉiuj konsentis pri neceso havi du malsamspecajn — p o r - esperantan kaj p e r - esperantan — aparatojn, kies celo estas la sama, sed taskoj malsamaj, kaj kiuj funkciu aparte, memstare kaj sendepende, sed evitante ĉian uzurpemon de unu sur aliun. Pli klare: la LEA devas nepre limigi sian taskon al la propagando de esperanto en iu nacilingva regiono kaj SAT al la aplikado de nia komuna lingvo sur tutmonda skalo.

*

Ne povas esti dubo, ke post tiu serioza, plensukcesa laboro nia afero daŭros kreski kaj firmiĝi. La Kongreso montris fidon al la Ekzekutivo; ĝi difinis al la tuta SAT-anaro direktojn por estonta laboro. Ni do ĉiuj denove laboru kaj firmigu en ni la konvinkon, ke ni plenumas gravan, necesan taskon por la emancipo de nia klaso.

*

Ĉu ne ekzistas makuletoj sur la bildo, kiun mi pentris? Kompreneble, jes. Ne ĉiuj kongresanoj estas klaskonsciaj SAT-anoj; ne ĉiuj venis al Göteborg kun la nura deziro labori por la prosperigado de nia movado. Vagemo kaj turismemo puŝis kelkiujn al la kongresa urbo. Aliflanke multaj SAT-anoj restas ankoraŭ ligitaj per diversaj, subtilaj ligiloj al la burĝa ideologio. Estus facile kritiki, moki, satire raporti. Ni ne estu tro severaj kaj postulemaj. Ni nur atentu, ke la emo ĉefe zorgi pri la ekstera flanko de nia afero, neniam superregu . . .

Alia motivo por ne esti absolute kontentaj pri nia VIII-a, estas la fakto, ke la SAT-Konferenco estis nur duonsukcesa. Ne sufiĉe da laboristaj organizoj sendis delegiton. Sed ankaŭ ĉi-okaze ni ne rajtas esti severaj. K-do M. Starr faris sian eblon kaj se la rezulto ne estas plene kontentiga, ĝi tamen estas tre instrua. Per tiu unua provo ni ĉiuj povas lerni. La eksperimento neniel estas negativa. Male, ĝi instigas nin daŭrigi la klopodojn, por ke la dua SAT-Konferenco estu pli sukcesa . . .

*

Rilate la teknikan aranĝon, la Kongreso estis modela, se ne senriproĉa. Gravajn plendojn mi ne aŭdis. La Organiza Komitato, kies animo estas Gek-doj Adamson, plenumis tute kontentige sian pezan taskon. Ili ne nur bone organizis la Kongreson, sed plie aranĝis grandiozan ekspozicion, kiu indus ampleksan priskribon, se tempo kaj loko ne mankus. Mi citu nur unu fakton: dum la unusemajna tempo de la ekspozicio estis disvendata por pli ol 800 sv. kronoj da esperanta literaturo. Nenio parolas pli elokvente ol ciferoj . . .

Niaj K-doj el Göteborg meritas ĉies dankon kaj gratulon pro ilia granda sukcesa laboro, sed ankaŭ pro ilia komplezemo kaj servemo.

Finiĝis la VIII-a Kongreso de SAT. Vivu la IX-a en Leipzig!

G ö t e b o r g, 20. 8. 28.

E. L a n t i.



La kongresanaro. — Multaj jam forvojaĝis

SUB RUĜAJ STANDARDOJ

Impresoj kaj travivaĵoj en Sovetio
de
Einar Adamson (Göteborg)

Prezo inkluzive afranko: **0,75** mk. g.

Aĉetebla ĉe la Adm. de SAT en Leipzig

Finkonkludoj de la VIII-a SAT-Kongreso

Kiel konkludo de siaj debatoj la Kongreso deklaras:

1. Aprobi la laboron de la Ekzekutiva Komitato de SAT dum la lasta interkongresa jaro. Ĝi fidas al tiu sama instanco por daŭrigi la laboron laŭ la ĝisnunaj direktoj.

2. Pro ŝanĝo en la sektorsistemo kaj ankaŭ pro tio, ke ne ĉiuj konsilantoj estis aktivaj en la plenumo de siaj taskoj, la Kongreso decidas ne renovigi la mandaton de la konsilantaro kaj komisias al EK funkciigi laŭstatute baloton por elekto de nova konsilantaro.

3. La Kongreso opinias necese, deklari denove, ke esperanto estas por SAT-anoj nur rimedo, kiun ili uzas en la intereso de la proleta klaso. Se la SAT-anoj konsistigas apartan organizon, estas nur pro tio, ke ĝenerale la gvidantoj de la laborista movado malatentas la problemon pri forigo de la lingvaj baroj inter diverslandaj proletoj. Lingvo Internacia ne povas emancipi la Laboristaron, sed la Laboristaro ne povos emancipiĝi sen la helpo de komuna interkomprenilo. Tial la laboristoj, kiuj pli speciale dediĉas sian tempon kaj energion en SAT, havas la firman konvinkon, ke ili tre efike utilas al sia klaso.

4. La Kongreso protestas kontraŭ la famaĉo, ke SAT havas celojn politikajn. Rilate al la politika agado de siaj membroj SAT akceptas neniun respondecon, tial ke tia agado okazas ekster la kadro de la Asocio. SAT havas ĉefe klerigajn kaj kulturajn celojn.

5. La Kongreso notas kontente la fakton, ke okazis interkonsento inter SAT kaj la LEA. Ĝi nur bedaŭras, ke la aŭstria kaj nederlanda asocioj ne sendis rajtigitan delegiton por partopreni tiun interkonsenton.

6. La Kongreso ankaŭ tre bedaŭras, ke multaj esperantistaj laboristoj restas ekster la SAT-vicoj kaj preferas subteni per siaj kotizoj burĝe neŭtralajn asociojn. Tiuj esperantistoj eraregas, opiniante, ke tiel ili pli utilas al la esperanta afero. La sepjara ekzisto de SAT jam liveris sufiĉe da pruvoj pri ĝia bona kaj ŝpara mastrumado.

Sufiĉas por tio fari komparon kun la t. n. centraj neŭtralaj organizoj esperantaj.

7. La Kongreso altiras la atenton de la tuta SAT-anaro pri neceso labori organizite, metode kaj laŭ la direktivoj donitaj de la Kongreso. Necesas, ke ĉiuj SAT-anoj konvinkiĝu, ke ili ĉiam devas konsideri la bonon kaj intereson de la tutmonda movado kaj ne nur tiun de sia urbo aŭ regiono.

8. Ankaŭ la kongresanoj tre dankas al la urbo Göteborg kaj ĝiaj enloĝantoj pro ilia gastemo al ni; dankas ankaŭ al sindikatoj de Göteborg, al kooperativa movado kaj al asocio de luantoj por la bona subteno kaj montrita simpatio al nia laboro, kiu celas doni al la mondo interkomprenigilon.

9. La Kongreso ankaŭ opinias necese danki al la Göteborgaj SAT-anoj, kiuj organizis kontentige por ĉiuj tre laborpovan Kongreson kaj bonuzis la okazon por altiri la atenton de la publiko al esperanto per tre brilaj kaj trafaj manifestacioj.

SCIIGO. Traktado okazas nun inter la Ekzekutivo de SAT kaj la Organiza Kongres-Komitato pri broŝura eldono de la protokolaro. Espereble ni povos baldaŭ sciigi la Legantaron pri la rezulto. E. L.

EL LA SONNEBERGA[1] LUDILINDUSTRIO

Nia hejma industrio nuntempe travivas strangan evoluon. Dum la pasintaj jaroj la entreprenistoj povis laborigi siajn dungitojn dum preskaŭ la tuta jaro, sed nunjare nur de julio ĝis septembro estas eble al la ludillaboristoj trovi laboron. — Kiuj estas la kaŭzoj de tiuj malsanigaj ekonomiaj cirkonstancoj? La eksterlandaj entreprenistoj fondis memstaran ludilindustrion; tio rilatas precipe al Usono. Iam tiu lando estis la ĉefa aĉetinto de niaj hejmaj produktoj; hodiaŭ ĝi mem produktas bonajn ludilojn kaj de ni aĉetas nur la plej malmultekostajn, kiuj pro la malaltegaj prezoj estas fabrikeblaj nur en Germanio. Tiujn malmultekostajn komercaĵojn ili foraĉetas per siaj "aĉetk eksport-entreprenoj" rekte de la hejmfabrikantoj. Pro tio amerikaj aĉetentreprenoj de kelka tempo samkiel fungoj elkreskas la teron. Ŝajnas, ke ili intencas dependigi la tutan industrion de amerika grandkapitalo kaj ilia agado konjektigas, ke ili sukcesos. El niaj ĉitieaj ludilvendejoj unu post la alia estas repuŝata de la usonanoj, kaj ĉi lastaj plej forte ekspluatadas la hejmlaboristaron.

Ĉi-supre mi menciis la hejmfabrikantojn pro tio, ke ili estas la faktaj produktantoj de la ludiloj. Dum dek ĝis dekdu horoj ĉiutage, kelkfoje dum ankoraŭ pli longa tempo, la fabrikanto laboregas kune kun sia edzino kaj plej ofte subtenas lin liaj infanoj por iom plirapidigi la produktadon kaj plialtigi la akiron. Ĉar se ne helpas la tuta familio, ofte ne estas eble al la familiestro nutri ĉiujn. — La prezojn de liaj varoj decidas la amerikaj negocistoj. Ofte tiuj entreprenistoj malsuprenpremas la prezojn tiele, ke estas tute neeble produkti la varojn por tiuj prezoj. Nur unu solvo restas por la hejmlaboranto: Dum kvarona jaro li povas labori, kaj se li ne emas, la ŝtato ne monhelpas lin dum la tri kvaronjaroj, dum kiuj li ne havas laboron. Do, ankaŭ la ŝtato mem malrekte helpas al la usona kapitalo, ekspluatadi nian industri-distrikton. Sindikatestroj asertas, ke la solvo de tiu ĉi malsimpla problemo dependas de la organizado de la hejmlaboristoj. Mi asertas, ke tio ne estas vera. Tuj, kiam ĉiuj hejmlaboristoj sindikataniĝos kaj batalos por pli bonaj prezoj por siaj varoj, iom post iom sed tamen nehaltigeble, nia industrio pereos[2].

Kiel jam supre dirite, la fremdaj landoj aĉetas de ni nur la malmultekostajn komercaĵojn; la pli bonajn kaj altkvalitajn, kiuj havigus al la produktantoj iom pli multe da mono, la alilandanoj fabrikadas mem. Se tiujn malmultekostajn varojn ni ne volas liveri, eksporto fariĝas tute neebla, kaj pro tro eta akir-povo de l' germana laboristo sur la germana merkato la industrio ne plu havas ŝancojn. Nia registaro konas la zorgojn de nia industrio, sed ĝi ne interesiĝas pri ĝiaj ekzisteblecoj. Konstrui kirasŝipon kaj armigi militistaron estas ŝajne pli grava tasko de l' ŝtato ol la solvo de l' problemo, kiu denove havigus panon al la laboristaro de la Sonneberga ludilindustria distrikto.

Do, mi konkludas: Se nuntempe ni havas b o n a n laboreblecon en nia industrio kaj tamen vivas m i z e r e, ĉiu povas imagi, kiel ni vivos, kiam la iro de l' negocoj estos m a l b o n a. Ĉiu logike konkludanta homo devas ekkoni, ke la krizo, kiun suferas nia industrio, estas nekuracebla kaj kondukos al ĝia absoluta ruiniĝo. S o n n e b e r g a n o.

---

[1] Sonneberg (en Turingio, Meza Germanio) estas centro de konata ludilindustria distrikto. — R e d.

[2] Certe! Sed tiu evolu-tendenco ekzistas kaj ne estas haltigebla! La kapitalismo ĝisevoluas sian plej maturan formon antaŭ ol esti anstataŭigata de l' socialismo (laŭ Marks). Miaopinie nia K-do malpravas, se li rekomendas al la laboristoj rezigni je socia batalo pro pli altaj salajroj, nur por prokrasti la (neeviteble okazontan) pereon de la primitiva industri-formo. — N. B.

Faktoj sen komentoj

Batalo pro pantalonoj

Somali, duoninsulo en orienta Afriko, estas donacita dum la lasta granda divido de la kolonioj al faŝista Italio. La faŝista komisaro ne povas italigi tie la lernejojn, ĉar la negroj ilin ankoraŭ ne havas. Sed kiel montri, ke faŝismo regas? La komisaro eldonis jenan leĝon: "Portado de pantalonoj estas privilegio de la blanka raso; indiĝeno, kiu permesus al si porti ion similan, estos punata per du jaroj da malliberigo kaj dudek kvin bastonbatoj." Granda estas la konfuzo de la indiĝena tribo Nicerto, kiam oni subite devis demeti siajn pantalonojn, kiujn jam dum generacioj oni kutimiĝis porti, kaj subite devis ekmarŝi sur stratoj kiel la prapatroj: aŭ tute nudaj aŭ ŝirmitaj per antaŭtuketo. Granda ekscito regas inter la indiĝenoj en Somali pro ĉi tiu faŝista ofendo. La ĉefo de la tribo Abdi Ŝejko penis konvinki la italan komisaron por nuligi ĉi tiun ordonon, sed vane. Abdi Ŝejko intencas prezenti sin dum septembra kunsido de Ligo de Nacioj, por meti antaŭ ĝi peton de Somaliaj viroj, ricevi rajton porti pantalonojn.

La hodiaŭa sociordo

Antaŭ kelkaj semajnoj oni arestis en Vieno vagulon, kiu misuzis forĵetitan bileton jam uzitan por veturado per tramo. Pro tio li estis akuzita de prokuroro kaj malkondamnita de la juĝistaro. Dum la proceso oni eksciis pri la akuzito, ke li estis iama inĝeniero 55-jara, kiu tiel mizeriĝis, ke li ne plu havis sufiĉajn monrimedojn por manĝi kaj tranokti kaj estis devigata almozpetadi kaj tranokti en libera kampo. Pri tiu ĉi afero legis en gazeto amerika sinjorino kaj estis tiel emociita, ke ŝi decidis donaci al la mizerulo kvincent dolarojn, kiujn ŝi deponis ĉe la direkcio de sanigejo, en kiu ŝi restadis. Ŝi alvokis en multaj gazetoj, por ke anonciĝu la serĉato, kies adreson oni ne sciis. Sed, eksciante pri la donaco, la donacito rifuzis la akcepton de la monsumo per letero, kiu aperis en la viena gazeto "La Mateno". Tiu ĉi letero estas plena da sarkasmo kaj maldolĉaj veroj. Por humile akcepti tiun monon kaj reekprovi la malnovan burĝecan vivon, la skribinto ne sentas sin kapabla. Kaj spite sia mizero li ne estas sufiĉe sklavsenta, por ne komprenigi al la riĉulino, ke ŝi prefere aĉetu al si por la kvincent dolaroj juvelon aŭ faru aŭtomobilvojaĝon tra Aŭstrio.

Trad. V i e n a n o 4684 (resumo).

Al ĉiuj Soveti-anoj!

Monon por la Adm. de SAT, ne sendu al Leipzig, sed al nia bankkonto ĉe C. K. de SEU en Moskvo, poŝtkesto, 630. Niaj bankoj ne akceptas sovetian monon. — A d m.

JOHANO PORTER

alia Paŭlo Kraŭĉ

Kiam la granda teksist-striko en Nju Bedford komenciĝis (15. aprilo), unu el la unuaj, kiuj aliĝis la teksistan strik-komitaton kaj tiele fariĝis aktivulo, estis la 19-jara Ĵon[1] Porter. Tiu junulo, pro sia batalemo kaj konscieco, baldaŭ fariĝis unu el la gvidantoj de la striko, kaj kiam la Nju Bedforda "Sindikato Teksista" organiziĝis, oni elektis lin kiel vicprezidanton de la nova unuiĝo.



Ĵon Porter kiel 15-jarulo, estis varbata en la usonan armeon. El-trovinte ĝian veran celon: servi kiel rimedo por ekspluatado de laborista klaso, li ribelis kontraŭ tio kaj en aŭg. 1927 forkuris post 2-jara kaj 2-monata servo. Kvankam li sciis, ke milit-tribunalo atendas lin, K-do Porter donis sian tutan tempon al la strikantoj kaj malkaŝe deklaris sin kiel membron de kom. junularo. La 18. junio li estis la sesan fojon arestita pro agado kiel pikedstaranto kun strikantoj. La polica kaŭcio, por lia antaŭprocesa liberigo, estis 1300 dolaroj; sed kiam al sindikatoficisto alportis la monon, oni sciigis lin, ke Porter estis jam forkondukita de la armeestraro. Tiu Porter-proceso similas la akuzon, kiu estis farata kontraŭ nia SAT-Kamarado Paŭlo Kraŭĉ[1]. Kiel la legantoj de "S-ulo" memoras, Kraŭĉ kaj Trembe[2] estis unue kondamnataj al 40 kaj 26 jaroj; nur pro tutmonda protesto laboristara tiuj verdiktoj estis malpliigataj je 3 kaj 1 jaroj.

La nov-jorka SAT-anaro jam sendis simpatian leteron al K-do Porter, kiu troviĝas en fortikaĵo Adams, Rod-insulo, milit-karcero (adr.: John Porter [Walerysiak] Guard House, Fort Adams, R. I.). K-do Kraŭĉ, kiu en sia funkcio kiel fakestro por militistaferoj de usona kom. junularo, lin vizitis, konvinkis lin, ke li eklernu esperanton por vere interfratiĝi kun eksterlandaj Gek-doj. G. Saville.

[1] Esp-e: Johano.

[1] Angle: Crouch. [2] Angle: Trumbull.

LETERO EL ARGENTINO

La du monatoj, sekvintaj la venkon de la havenlaboristoj en Rosario, karakteriziĝis per daŭre aktiva kaj persista laboristmovado. Ŝajnas, ke iu mistera forto deskuis la indiferentecon kaj vekis la laboristojn de la urbo el longa dormado. Tiu viviga forto ne nur trapenetris la konscion pri neceso de organizado ĉe la urbaj laboristoj, sed ĝi eĉ skuis la laboristojn tra vasta kamparo, en diversaj lokoj de ĉi tiu provinco. Sekve organiziĝis la sakportistoj de greno kaj la kondukistoj de ĉaroj kaj ŝarĝaŭtomobiloj, kiuj transportas la grenon ensakigitan al la grendeponejoj, en Kasilda (hispane: Casilda), Los Molinos, Arekito (hisp.: Arrequito), San Hose de la Eskina (hisp.: San Jose de la Esquina), Arteaga ktp. Ili tuj postulis plialtigon de salajro kaj plibonigon de laborkondiĉoj. La mastroj malakceptis kaj la laboristoj deklaris la strikon, kiu daŭris pli ol unu monaton, ĝis la mastroj devis akcepti. En Rosario mem multaj laboristoj jam estis organizitaj, multaj ankoraŭ ne. Nun oni klopodas organizi ĉiujn laŭeble. Tiuj klopodoj preskaŭ plene sukcesas. Jam multaj reorganiziĝis en fortaj sindikatoj. Tuj post organizado oni prezentis al siaj respektivaj ekspluatistoj la postulojn rilate plialtigon de salajro, malaltigon de laborhoroj (okhora labortago) kaj plibonigon de laborkondiĉoj. Car la entreprenistoj rifuzis pridiskuti tiujn kondiĉojn, la laboristoj deklaris la strikon. Tiai strikas, de la komenco de julio: la tramistoj, la kondukistoj de ĉaroj kaj de ŝarĝaŭtomobiloj, la laboristoj de teksindustrio, de sukerrafinejo, de lignosegejoj, de panfarejoj, masonistoj kaj masonisthelpantoj, la laboristoj de akvokondukejo, de elektrolumo kaj elektroforto, telefonistoj, sakfaristoj kaj sakriparistoj ktp. Tre ekscititaj estas la kapitalistoj. Ĉiutage flugas iliaj notoj de plendoj kaj protestoj al policestro, al provincestro, al ministroj, dirante ke la urbo travivas momentojn de ĥaoso, de anarkio, ke la "vivaj fortoj" de la urbo estas minacataj de grava danĝero, ke oni ne plu respektas la privatan propraĵon ktp. Dume la laboristoj heroe persistas kaj propagandas por kontraŭstaro ĝis fina venko.

Ivan Miličič Ivotov (1933).

TAGO EL MIA VIVO

La urbo Ivanovo-Voznesensk, en kiu mi loĝas, estas granda teksindustria centro. Ĝi havas 111 000 loĝantojn. Sur bordo de rivero Uvod staras teksaj fabrikoj. Nuntempe oni ankoraŭ konstruas novajn kaj novajn fabrikojn, konstruojn kaj loĝejojn por laboristoj. Mi estas laboristino en granda fabriko; mia profesio estas desegnistino, mi laboras jam kvaran jaron. Mi estas 20-jara. Mi loĝas memstare jam 10 jarojn. Mi ne havas gepatrojn, sed mi havas gefratojn, kiuj loĝas en urboj Kineŝmo kaj Moskvo. Estante sen gepatroj mi faras ĉion mem. Nia domo, en kiu mi loĝas, estas granda. Sed mi loĝas en malgranda ĉambro, en kiu staras lito, du seĝoj, tablo kaj ŝranko. Kvankam malgranda, la ĉambro estas pura. Krom mi ankoraŭ loĝas tie direktoro de nia fabriko kaj lia familio.

Mia tago komenciĝas matene je la oka horo. Je la sepa la edzino de l' direktoro preparas teon, ĉar la direktoro foriras je la sepa kaj duono en laborejon. Mi ellitiĝas, lavas min kaj trinkas teon. Je la naŭa horo mi iras labori en fabrikon. En nia fako laboras ses personoj: tri desegnistoj kaj du junaj gedesegnistoj; mi estas la tria. Mia laboro al mi plaĉas, ĉar ĝi estas tre interesa. Mi faras diversajn desegnojn. Mi havas tre malfacilan desegnon, sed mi penas por ke ĝi estu utila por fabriko kaj ŝtato. Mi laboras 7 horojn. Tagmeze estas duonhora paŭzo, kiam mi manĝas. Post laboro mi iras hejmen kaj tagmanĝas. Tiam mi ripozas. Je la deknaŭa mi iras en laboristan klubon, kie mi legas ĵurnalojn kaj gazetojn. Tie mi restas ĝis la 22-a. Lunde kaj vendrede mi vizitas la lecionojn de esperanta rondeto, merkrede kaj sabate mi vizitas partiajn kunvenojn. (Mi estas ano de komunista partio kaj komjunulino. Ankaŭ mi estas ano de teksista unuiĝo, kooperativo, Ruĝa Helpo, SAT kaj SEU.) Baldaŭ mi vizitos pentrolernejon.

Sed jen estas vespero. Je 22-a la familio de l' direktoro kaj mi sidas ĉirkaŭ tablo kaj trinkas teon. Je la 23-a aŭ 24-a mi enlitiĝas. Dimanĉe mi ne laboras kaj ellitiĝas je la 7-a horo, por hejti fornon kun la direktor-edzino kaj prepari por mi mem maten- kaj tagmanĝon. Kiam ĉio estas farita, mi trinkas teon, legas librojn aŭ iras glitkuri. Vespere mi promenas kun mia amikino kaj vizitas teatron aŭ kinon. Mi havas notlibron, en kiu mi notas mian buĝeton.

Raisa Matveeva (10760),
fabriko BIVM, Sovetio.

SAT-anoj

En viaj korespondaĵoj al la Administrejo ĉiam citu vian membro-numeron.

EL LA HISTORIO DE L' SOCIALISMO

2. Aŭn[1]

Aŭn predikis formon de komunismo. Lia filozofio estas la ateismo kaj la nerespondeco. Lia kritiko estas la priskribo de l' ekonomia malordo en la produktado, en la dispartigo de l' riĉaĵoj kaj en la organizo de l' laboro. "La malbono — li diras — venas de la konkurado malorda de la laboristoj; la kuracilo estos la kooperado aŭ la kolektiva labororganizo, tiel ke ĉiuj penadoj estu kunordigitaj kaj reguligitaj." Lian pozitivan sistemon oni povas resumi jene: absoluta forigo de l' propraĵo, ekstermo de l' komerco, kiom ĝi estas peranto, kaj de la mono; rekta interŝanĝo de l' produktoj kontraŭ produktoj; nuligo de l' familio kaj de l' religio, kompleta instruado, absoluta egaleco, starigo de komunumoj organizitaj laŭ ĉi tiuj principoj, kapablaj provizi sin mem per siaj bezonaĵoj.

En la komunumo de Aŭn ne ekzistas hierarkio (rangogradoj), krom la funkcioj determinitaj per la aĝo. Unua ciklo de edukado etendiĝas ĝis la 15-a vivjaro finita; tiam sekvas la ciklo de l' produkt-laboristoj: 16-jara la individuo fariĝas aktiva laboristo ĝis 25 jaroj; la civitanoj de 25—30 jaroj dispartigas kaj konservas la havaĵojn; tiuj de 30—40 jaroj disdonas la socilaboron kaj okupas sin pri la interna administrado de l' komunumo; la plej aĝaj reguligas, en kongresoj, la rilatojn de komunumo al komunumo, fine, plej supre, troviĝas gvidanta konsilantaro.

Aŭn, kiu prenis kiel devizon: "Mi detruos kaj konstruos", provis, fakte, sed sensukcese, aplikon de tiuj ĉi teorioj en Nov-Harmonio, en la ŝtato Indiana. Oni devas diri, ke tiu ĉi provo estis farata en bedaŭregindaj varbkondiĉoj; sed Aŭn ne sukcesis pli bone en siaj diversaj samspecaj provoj en Usono.

La filozofiaj kaj komunismaj ideoj de Aŭn estas klarigitaj en siaj du verkoj[2]): Novaj rimarkoj pri la Socio (1812); Historio de l' politika ekonomio (1818).

[1] Angle: Owen. [2] Ne esperantigitaj.



Ĉu Religio estas privata afero?

Teoria studeto

En la Erfurta Programo estas dirite, ke religio estas privata afero. Sur tio apogas sin diversaj laborist-gvidantoj, konkludante, ke kontraŭ privata afero ne necesas kaj oni ne rajtas batali.

Kion ni respondu al ili?

Karlo Marks diris, ke "religio estas opio por la popolo". Ĉiu el ni scias, ke opio estas veneno danĝera por la socio, kiun sekve ĉiu konscia laborulo devas kontraŭbatali. Se Marks komparis la religion al opio, li neniel intencis ŝerci, sed per tio volis atentigi pri la neceseco de kontraŭbatalo.

Do je la unua rigardo Marks kaj la Erfurta Programo kontraŭas unu la alian, ĉar aŭ la unua pravas, tiam malpravas la dua, aŭ pravas la dua, tiam malpravas la unua. Se ni tamen pli profunde esploros la aferon, ni vidos, ke ambaŭ pravas.

Marks diris: "Religio estas opio por la popolo", tio estas por la sufokata klaso. Ĉi tiu klaso do nepre devas sin liberigi de la veneno, tio estas kontraŭbatali la diversajn religiojn kaj ĉiajn iliajn subtenantojn.

En la Erfurta Programo estas dirite: "Religio estas privata afero". Sed por kiu? Por la Proletaro ĝi jam ne povas esti privata afero, ĉar "opio" estas ja socia problemo, kiun prisilenti estus peko. Do por kiu ĝi tamen estas privata afero? Ni respondas: Por la ŝtato.

La ŝtato, kiu devas objektive toleri la individuajn inklinojn de ĉiu ŝtatano, se ili nur ne fariĝas danĝeraj por la amasoj, devas ankaŭ la religion trakti kiel individuan, privatan aferon. Tio signifas, ke se iu ekzemple emas preĝi, la ŝtato kiel tia ne rajtas tion malpermesi al li. Aliflanke la ŝtato ankaŭ ne rajtas subteni la religion per subvencioj el la ŝtatkaso. Kiu bezonas preĝejon, ĝin mem konstruu.

La ŝtato ankaŭ estas devigita malpermesi la disvastigon de la socidanĝera veneno "religio", tio estas senigi ĝin de la socia rolo, por ke ĝi fariĝu privata.

Ni ne nur konsentas, ke religio fariĝu privatafero, sed eĉ tion senĉese postuladas de la ŝtatoj. Tamen la burĝaj ŝtatoj tute ne emas kontentigi niajn postulojn, sed kontraŭe pli kaj pli interamikiĝas kun la religio kaj la pastraro, vidante en ili unu el la plej bonaj apogiloj de la kapitalista regado.

Iuelmultiuj.

Inter la montoj de Kaŭkazo

Ĉu ekzistas iu loko en Sovetio, kie oni ne konas la nomon de Lenin? Fakte antaŭ du jaroj en unu el montvilaĝoj de Norda Kaŭkazo kaj ne tre malproksime de grandaj vojoj, troviĝis virinoj, kiuj miris, aŭdante unuafoje pri Lenin. Per tiu fakto estas malkovrita la tuta profundo de malklereco de la montvirino. Severa "adat"-o (kutimo de la montoj) kreis por la montaranino tiun premegan, sklavan staton, en kiu ŝi troviĝis dum multaj jarcentoj...

La virino en montvilaĝeto ("aŭlo") estas tute senrajta estaĵo. La knabino ankoraŭ povas gaji, murmuri kaj danci kun junaj veturigistoj ("ĝigitoj"). Sed edzino estas devigata stari flanke kaj observi aliajn, kiuj gajas. Ŝi povas paroli ie post vilaĝo kun najbarinoj. Sed la unua preterpasanta viro povas dispeli ilin "por ordo". Mahometana religia leĝo konsideras la virinon kiel estaĵon de malalta rango. La montara kutimo enirigis ankoraŭ tutan serion da korektoj en la leĝaro, kiuj plene faras sklavino la virinon. La bofilino, ekzemple, ĝis nasko de unua infano ne povas interparoli kun iu el pli aĝaj homoj en la domo. En diskutoj pri familiaj aferoj ĝenerale havas rajton partopreni nur la plej aĝa virino en domo. La pezaj laboroj restas al virino: forigo de greno kaj fojno, draŝo, venigo de hejtligno el arbaro.

"Edzino devas sperti la skurĝon", tio estas sankta kutimo de "adato". "Unu dio por viro, du por virino: Allaho kaj ŝia edzo", tio estas montara proverbo. Tial, kiam la viro rajdas sur ĉevalo, la virino marŝas apude kaj teniĝas ĉe selo. — Certe, la plej forta esprimo de sklava stato de montaranino estas pago ("kalim"). Per pago por la fianĉino la virino fariĝas objekto, varo. Ju pli riĉa estas fianĉo, des pli bonan fianĉinon li povas aĉeti por si. La fianĉinoj havas diferencan valoron: la knabinoj de 50 ĝis 2000 rubloj, vidvinoj kostas je la mezo (duono? — Red.) pli malkare ol tiun prezon.

Oni povas aĉeti la edzinon por ĉevalo aŭ du bovoj ktp. Laŭ la "adato" — (montara) kutimo la "kalim" estis permesata, sed ne laŭ la religia mahometana leĝo ("ŝariato"). Tial eĉ la religia gvidanto de montribeluloj Ŝamilj malpermesis tiun aĉetadon de edzinoj. Tial en Dagestano, kie gvidis kaj regis Ŝamilj, la poredzina pagsumo malofte atingis 50—60 rublojn, kaj kelkfoje pago tute forestis.

Dume tiuj montaraj kutimoj estas ekstermataj. En la vilaĝoj aperas virinfakoj kaj vartejoj. En specialaj domoj oni faras diversajn laborojn kun la nelegosciaj virinoj kaj lernigas al ili diversajn metiojn. Tio donas eblon al montarvirino iom post iom eliri el sia sklava stato kaj esti libera civitanino. La vilaĝoj travivas sian kulturrevolucion. Ankoraŭ antaŭ nelonge en malkulturaj vilaĝoj de montoj, malgraŭ la kristanismo, ekzistis diversaj idolanaj kultoj: petego al arboj, bestoj ktp. Apero de doktoroj en vilaĝoj kaŭzis teruron. Nun tio forpasis.

En malproksimajn vilaĝojn venis elektro. Kaj ne plu ekzistas nun, en vilaĝoj, virinoj, kiuj ne konas la nomon de Lenin.

Esp-igis V. Makarin (11 220).

TRA ESPERANTIO

XIV-a Internacia Junulara Tago

En tiu ĉi tago (2. 9.) kredeble multaj ĉeloj kaj rondetoj estos pruvintaj la valoron de peresperanta laboro. Troviĝas ja multaj aktivaj junaj SAT-anoj, kiuj mem en siaj junular-organizoj havas influon kaj ne preterlasas la bonan okazon, por propagandi esperanton, utiligante ĝin en la praktiko. Ni ricevis de la regiona komitato de Komsomol (Kom. Junularo) ĉe fabriko Ĉermoz ap. Perm (Uralo, Sovetio) sufiĉe longan leteron en esperanto kun la peto pri publikigo. Ni citu nur ekstrakte, kion okaze de la junulara tago tiu ĉi komitato diras al la tutmonda kom. junularo: "Ni preparas depost 23. julio la solenon de Intern. Junular-Tago. Niaj ĉefaj taskoj: internacieca edukado de la kom. junularo; plifirmigo de la interligo kun alilandaj K-doj per korespondado kaj financa subteno de alilandaj frat-organizoj; varbado de la laborista junularo en nian Ligon: El 714 gejunuloj en nia fabriko 289 (aŭ 40%) estas kom. junuloj. Tria ĉeftasko: interesi la labor. junularon por plibonigo de la fabrika produktokapablo. Dum la someraj monatoj la agado estas malpli aktiva: ĉiuj iom post iom libertempas dum tiu periodo; oni aranĝas ekskursojn, koncertpromenadojn, turistmigradon en la nordan Uralon, vaporŝipe ktp. De 15.—22. julio okazis landdefenda semajno, dum kiu ni varbis 50 novajn membrojn por "OSO-Aviaĥim" (Societo por subteno de defendkapablo de Sovetio) . . ."

* * *

K-do 9170 demandas pri la devoj de J u n p e r a n t o de SAT. Vere mi devas konfesi, ke mi ne estas informita (per nenia raporto) pri la funkciado de Junperanta servo. Mi ne scias, kiel la ĝisnunaj junperantoj komprenis kaj solvis sian taskon. Mi persone vidas la jenajn tri taskojn por junperantoj en nia organizo: 1. respondi al demandantoj pri junular-aferoj ĉiuspecaj (se respond-afranko estas pagata, kompreneble!); 2. agiti, por ke ĉiuj junaj esp-istoj senescepte aliĝu al SAT, klarigante al ili celojn kaj taskojn de nia organizo kaj klerigante, edukante ilin en tiu senco; 3. starigi kaj akceli korespondadon inter ĉiulandaj junk-doj. La korespondado nuntempe restos ankoraŭ la ĉefa kaj preskaŭ sola interligilo, dum ni ankoraŭ ne estas sufiĉe fortaj, por fondi libertempan kolonion por geknaboj (vidu Jarl. pĝ. 7), junular-tendarojn ktp.

* * *

La SAT-junularo estos ĝojigita pri la apero (dum septembro ankoraŭ) de libreto "Fabeloj de Hermynia Zur Mühlen" (la en junularaj rondoj tre konata proleta verkistino). Atentu la anoncon en venonta(j) n-o(j) de "S-ulo"! Ankoraŭ alia rakonto por la junularo estas en preparo kaj aperos antaŭ jarfino. Tiele kelkaj lastatempe elstarigitaj deziroj trovos sian kontentigon.

N. B.



M o s k v o, 25-an de julio 1928.

Al redakcio de "Sennaciulo".

O f i c i a l a l e t e r o.

Estimataj Gek-doj!

Centra Komitato de Sovetrespublikara Esperantista Unio (CK SEU) petas vin publikigi en via estimata gazeto jenan informon:

Lastatempe apartaj neŭtralaj esperantistoj, ankoraŭ loĝantaj en Sovetio kaj per ĉiuj rimedoj kontraŭbatalantaj proletan esperanto-movadon, en siaj leteroj al eksterlando disvastigas mensogajn sciigojn pri kvazaŭ politikaj kaj ekonomiaj krizoj en Sovetrespublikaro, pri kvazaŭ kruela traktado al politikaj enkarcerigitoj, troviĝantaj en malliberejoj de Sovetio ktp. Certe eksterlandaj proletaj esperantistoj, ĉiam amikece kaj kun granda atento interesiĝantaj pri vivo kaj progreso de la unua en mondo proleta ŝtato, estas konfuzataj de tiuj informoj kaj rezulte al SEU-organizoj kaj apartaj Sovetrespubilkaraj esperantistoj venas multaj demandoj pri vereco de tiuj informoj.

Neniom timante kaj neniam rifuzante sincere konfesi al niaj eksterlandaj klasfratoj tiujn aŭ aliajn difektojn kaj mankojn en vivo kaj disvolviĝo de Sovetrespublikaro, *CK SEU en nomo de 16 000 Sovetlandaj proletaj esperantistoj oficiale deklaras al tutmonda esperantistaro, ke suprecititaj informoj de neŭtraluloj estas iliaj elpensaĵoj, estas senhontaj kalumniaj mensogoj.* Malgraŭ multaj malfacilaj baroj, malgraŭ apartaj eraroj, difektoj kaj mankoj en laboro, Soveta ŝtato ĉiam progresas, ĉiam iras antaŭen. Kaj vane neŭtraluloj per siaj mensogoj celas naski konfuzon en cerboj de alilanda proleta esperantistaro kaj eble eĉ la malesperiĝon je indeco de la Soveta sistemo mem.

Vidante konstantan rapidegan progreson de proleta esperanto-movado en USSR, Sovetlandaj neŭtraluloj (inter kiuj troviĝas dipastroj, estintaj caraj oficistoj ktp.) celas naski ĉe eksterlandaj proletaj esperantistoj malkonfidon je leteroj de Sovetlandaj esperantistoj SAT-anoj kaj SEU-anoj kaj tiamaniere ŝanceli bazon de proleta esperantomovado en Sovetrespublikaro. CK SEU ricevis leterojn, de germanaj K-doj kun sciigo, ke ili ricevadas anonimajn leterojn el USSR, en kiuj sendintoj de la leteroj asertas, ke kvazaŭ ekzistas en Sovetrespublikaro ia ŝtata Esperanto-cenzur-oficejo, al kiu devas sovetlandaj esperantistoj sendi por trarigardo la leterojn, sendatajn de ili al eksterlando. Tiel do kvazaŭ evidentiĝas, ke sovetrespublikaraj esperantistoj skribas ne tion, kion ili volas, sed kion deziras la registaro. CK SEU ankaŭ devas oficiale deklari, ke tiuj anonimaj fi-leteroj de neŭtraluloj estas same mensogaj kaj sur nenio bazitaj. *Nenia ŝtata esperanto-oficejo, nenia cenzuro de leteroj, sendataj al eksterlando, ekzistas en Sovetio,* kion pruvas eĉ tiu fakto, ke neŭtraluloj sukcesis sen ia ajn malhelpo dissendi al eksterlando siajn mensogajn sciigojn (dissendi anonime, ĉar subskribi siajn elpensaĵojn ili hontis).

Sovetlandaj esperantistoj SAT-anoj, kaj SEU-anoj skribas al siaj eksterlandaj klasfratoj nur veron, nur tion, kion diktas ilia klasa honoro, ilia laborista koro. De ilia nomo ni esprimas certan esperon, ke eksterlandaj proletaj esperantistoj komprenos la fiecon de neŭtralulaj ruzaĵoj kaj helpos al ni batali kontraŭ tiuj neŭtraluloj, plifortigante korespondadon kun Sovetrespublikaro, plidensigante nian batalunuecfronton kontraŭ niaj komunaj klasmalamikoj.

Kun sennacieca saluto,

Sekretariaro de CK SEU:

(subskriboj)

E. Drezen. A. Jodko. N. Nekrasov.
G. Demidjuk. R. Nikolskij.
V. Varankin.

Literaturon

riĉan bezonas SAT.!

Vi helpos trafe al ĝia kreado, aĉetante la **AKCIOJN** de la **ELDON-KOOPERATIVO!** — Prezoj:
Serio A = 1 dolaro,
Serio B = 1/2 dol.



Turnu vin al la Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

NE PRUNTEDONU VIAN JARLIBRON!

La 25. julio la ŝtata prezidanto de Latvio G. Zemgals ricevis el Litovio esperante redaktitan telegramon kun proks. jena enhavo: "Kompatu kondamnitojn. Viveco estas plej karega al ĉiuj. Malaŝauskas, Kaunas." Ŝajnas, ke la enhavo rilatas al antaŭ nelonge en urbo Rezekne kondamnitaj limgardistoj. Laŭ raportoj en gazetoj ili regule kaj detale spionadis por Sovetio pri politikaj, sociaj, sed precipe pri militaj cirkonstancoj en Latvio. Pro tio ilin oni kondamnis severege: kelkaj estos pendigitaj, multaj tutan sian vivon, aliaj longajn jarojn devos pasigi en malliberejo. — La telegramo kreis grandan intereson inter niaj politikaj eminentuloj, kaj ili ege deziras kaj penas ekscii, kiu estas tiu Malaŝauskas. Ĉu vi opinias, K-doj, ke ili kompatos tiujn homojn kaj eble serĉas la sendinton de l' telegramo por sciigi tion al li aŭ danki pro lia intereso? — Ho ne! Mi preferas jenan solvon: Alproksimiĝas 10-jara jubileo de "sendependeco" de Litovio. Nia registaro deziras por la "parenca" faŝista registaro en Litovio prizorgi festdonacon. Freŝa laboristo por la jubilea festeno ja estas tre taŭga, ĉu ne? Sed... malbenita afero... li estas nekonata...

Vizitis min loka UEA-ĉefdelegito, sendito de policestro (prefekto de Riga) kaj "amike" komencis min demandi: "Ĉu eble tiu Malaŝauskas ne estas SAT-ano? Eble lia adreso estas en nunjara SAT-jarlibro? En pasintjara ne estis, tion mi scias." La servema al polico delegito ricevis de mi "konvenan" respondon...

Ĉu tiu Malaŝauskas estas SAT-ano aŭ ne, tion mi ne scias, sed nun estas klara, ke tiu UEA-delegito ricevis de iu K-do SAT-jarlibron pasintjaran. Kaj tiu K-do estis iu aŭstria SAT-ano! — K-doj! Gardu vian Jarlibron! Neniajn sciigojn donu al la "neŭtraluloj"! Vi ja neniam povas kontroli, por kiaj bezonoj efektive oni postulas la sciigojn. SAT-anoj — estu konsciaj! (9452)

DISKUTEJO

Pri Radio-Paĝo

Kial la Radio-Paĝo en "S-ulo" ne plu aperas? Ĉu Radio-tekniko tute ne interesas la Gek-dojn? Ĉu neniu el Radio-amatoroj k specialistoj inter SAT-anoj deziras interŝanĝi sian sperton? Ĉu ni ne povus interesi vastajn amasojn de Radio-amatoroj pri lastaj atingaĵoj en Radio-scienco en div. landoj, se ni havus en Radio-Paĝo tiajn interesajn sciigojn? Ĉu ni per tio ne altirus la atenton al esp-o? Nun ne aperas ia speciala esp-a Radiogazeto. Tamen en tiu regiono oni povus havi efikajn rezultojn. Jam oni preparas per la lab. Radio-organizoj en Sovetio k Germanio Labor. Radio-Internacion, kies bezonojn ni devos priservi. Mi proponas reaperigon de Radio-Paĝo en "S-ulo". Krome mankas ĝis nun en esp-o tute lerniloj, libroj, gvidiloj laŭ Radio-etero. Mi komencis aranĝi "Gvidilo tra tutmonda Radio-etero" k "Fundamento de Radio-tekniko", por kio mi bezonas materialon k kunlaboron de fakuloj en ĉiuj landoj.

A. Grohotov (7348), komisiite de Intern. Sekcio de regiona societo de Radio-amikoj, Ĥerson, Poŝtkesto 55, USSR.

Rim. de la Red. — Dum la tempo, kiam ni regule aperigis la Radio-Paĝon en "S-ulo", ni ricevis de multaj flankoj vivajn plendojn pri la fakto, ke ni uzas la limigitan spacon de "S-ulo" por Radio-aferoj, kiujn la plejmulto el abonantoj tute ne legas. Ni ne scias, ĉu hodiaŭ la stato ŝanĝiĝis. Sed ni dubas, ke la elcento da Radio-amatoroj en SAT estas tiel granda, ke ni kontraŭ la ceteraj legantoj povus pravigi la forprenon de tiom da spaco en la gazeto. Kompreneble ni ĉiam estas pretaj, doni nelongajn informojn pri gravaj aktualaĵoj el la Radio-tekniko en "S-ulo" (kiel ni ĝis nun faris).

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

SOVETIO. — Pskov. 3. 6. okazis gubernia esp. konferenco kun 17 pers. k 9 gastoj. Ĝi resumis 2-jaran agadon. Nombro de SEU- kaj SAT-anoj altiĝis de 14 al 52 k de 4 al 43. Dum vintro okazis 15 rondetoj en Pskov, Veliĵ, Ostrov, Opoĉka, Ĥolm, Porĥov kun 232 lernantoj. Ni vendis dum 6 monatoj da lernolibroj Rublev: 138 ekz., Lidin: 160 ekz., Svistunov: 28 ekz., da div. vortaroj 39 ktp., sume por 143 rbl. Rilatoj al redakcioj de lokaj gaz. k murgaz. estas bonaj. Dum 10 monatoj aperis 63 let. k 21 div. notoj. Apartan sukceson havis la let. por Okt. Revol. k datreveno de Ruĝarmeo, 1. majo k tago de gazetaro. Div. organizoj iom favoras nian movadon. Ĉe kulturfako estas organizita esp. konsultejo. Per esp-o la laboruloj de Pskov montris solidarecon: Ruĝfrontanoj el Leipzig sendis 6100 helpmarkojn por valoro de 305 rbl., kiuj estis disvastigataj inter loĝantoj k ruĝarmeanoj, la mono sendita al Leipzig.

E. Filimonov (3939).

Ĉe la neŭtraluloj

En Hago okazis de 31. 7. ĝis 2. 8. la Interreligia Konferenco por la Paco kun 450 enskribitaj partoprenantoj el 11 landoj. Celo: interalproksimigi la reprezentantojn de la diversaj Eklezioj kaj religiaj konfesoj. La kunveno ne estis pure esp-ista, sed iniciatita de la neŭtralaj esp-istoj k sub ilia gvidado. Sola traduklingvo estis esp-o.

Samtempe okazis en Bruselo Konferenco de Universitatanoj esp-istaj, en kiu oni decidis krei specialajn esp. universitatajn organizojn en ĉiuj landoj.

La 20-a Universala Esp. Kongreso okazis de 3.—11. aŭgusto en Antverpeno. Partoprenis ĉ. 1500 kongresanoj. La malferma soleno okazis je granda pompo. La urbestra reprezentanto parolis en flandra lingvo (rimarkinde estis, kiel la flandraj naciistoj utiligis la Kongreson por konigi siajn celojn). S-o Privat faris grandaplaŭde sian tradician kongres-paroladon. La opozicio, kiu dum lasta tempo estis stariĝinta kontraŭ li, estis mortbatata dum tiu Kongreso. "La fulmotondro, pendinta sur la ĉielo de nia movado, forpasis ne malutilinte", esprimas sin "Heroldo"... "Eksplodis kelkaj tondroj de disputo kaj akraj paroloj — sed finfine tiu fulmotondro efikis nur purige..." Oni prezentis en la Operdomo "Hamleton" en esp-o.

FOR LA NEŬTRALISMON!

Ĉiam denove ni trovas pravigon por nia agitvorto ĉi-supra! Esperanto je la servo de l' faŝismo — jen la esenco de ĉefartikolo en la itala esp. gazeto "L' Esperanto" de junio 1928 pri "La herooj de l' poluso" (la Nobile-ekspedicio). Tre lerte kaj prave estas klarigata la utilo de esp-o por la aviado, kaj konklude ni legas: "Facile lernebla, de plej granda kaj konfesita didaktika valoro, esperanto estos rapida, utila bonvenaĵo, la mirinda ŝlosilo, kiu malfermos al la italaj aviadistoj la pordojn de l' mondo, kiu portos tra la mondo la penson kaj la parolon de l' faŝista Italio."

Justeco ekzistas nur en Vero,
Feliĉo troviĝas nur en Justeco

E. Zola.

INTER NI

— Mi tre simpatias vian movadon kaj plene konsentas, ke esperanto estas necesa por la laborista klaso; sed tia lingvo fakte povos utili nur kiam ĝia instruado estos deviga en la lernejoj de ĉiuj landoj...

— !!! ???...

— Ne ekscitiĝu; mi parolas al vi kiel homo, kiu havas sperton en laboristaj aferoj...

Tiel parolis al mi eminenta gvidanto de la laborista movado. Kaj ĉiu el ni bone scias, ke tia rezonmaniero estas tipa ĉe la nuraj "simpatiantoj" de nia lingvo.

Simpatio estas ja bela afero! Ĉiu ajn alparolito respondas, ke li simpatias la pacon, ke li malbenas la militon, — kiu kaŭzas tiom da suferoj, da ruinoj ktp. Patose dum horoj povas paroli pri tiu temo "eminentaj" personoj. Sed demandu, ĉu por eviti militon ili konsentus malaperon de "sia" patrio, ĝian kunfandiĝon en pli grandan unuon. Tiam ili rigardos vin kun abomeno, kiel bruligindan herezulon al kiu eĉ ne decas respondi.

Oni vorte volas la pacon, sed fakte oni preparas la militon; oni volas enkonduki esperanton en la lernejoj, sed por tion atingi oni nenion faras. Oni eĉ kvazaŭ kompateme rigardas al la esperantistoj, kiuj elspezas tempon kaj energion por ellerni kaj instrui lingvon, — kiu povos utili nur kiam ĝi estos devige instruata en ĉiuj lernejoj... Ni estas fantaziuloj kaj la "simpatiantoj" de esperanto estas prudentuloj, kiuj okupiĝas nur pri seriozaj praktikaj aferoj. Ili opinias sin la saĝaj — kaj nin la malsaĝaj.

Tiaj saĝuloj fakte estas mistikuloj. Ili kredas, ke iun belan tagon mirakle esperanto estos instruata en la lernejoj; mirakle la instruistoj el tiuj lernejoj ekkapablos instrui la lingvon; mirakle homoj scipovos ĝin flue paroli; mirakle estiĝos verkistoj, kapablaj doni al la artefaritaĵo animon, senton kaj imitindan tradicion...

Ĉe tia konstato ni devas pli kaj pli forte konvinkiĝi, ke estas ni la saĝaj, ĉar ni racie faras pozitivan laboron, ĉar ni konstruas kaj ne nur planas pri mirakle starigotaj konstruoj... E. L.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Accion, Mar del Plata, 25. 7. (Tago de ruĝarmeano).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Humanidad, Buenos Aires, julio; Pskovskij Nabat, Pskov, 13. 6., Munkas (laboristo), Bratislava, 18. 8.

Peresper. artik., leterojn ktp. presis:

Pskovskij Nabat, Pskov, 28. 4., 5. 5., 17. 7., 28. 7. Pskovskij Paharj, Pskov, 1. 5., 9. 5. Nia Vojo, Pskov, 1. 5., Neue Zeitung, München, 18. 8. (Ĉita).

Pri la SAT-kongreso raportis:

Signalen, Stokholmo, 16. 8., Göteb. Posten, Göteborg, 16. 8., Göteb. Tidningen, 14. 8., 15. 8. (kun bildoj), Ny Tid, Göteborg, 16. 8., Daily Herald, London, 20. 8. (tre bona rap.).

NIA POŜTO

11 325. — Jes, ni uzos viajn verketojn por "L. L.".

4684. — Ni uzis vian laboron, sed en resumita formo, ĉar mankas loko.

135. — Jes, ni enpresos vian konsilon, tuj kiam loko permesas.

10 688. — Legu en tiu ĉi n-o pri junularlaboro. Ĉu ni reaperigos specialan paĝon, dependas de la ricevota materialo (ne nur ĝia kvanto, sed ankaŭ ĝia kvalito).

Vaguloj. — Ni komencos baldaŭ publikigi vian serion. Sed loko momente ne permesas.

9425. — Ni certe uzos el la materialo ion por "L. L.".

1307. — Via artik. nepre aperos en la venonta n-o. K-do Lanti ankoraŭ ne revenis de sia vojaĝo.

1851. — Ni ricevis de K-do O. B. multan materialon vian. Ni uzos laŭbezone.

Al Junular-Sekcianoj. Ne forgesu aldoni respond-afrankon, se vi havas demandojn al la sekretario. N. B.

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

AŬSTRIO

K-do Richard Atlas, Billrothstr. 23/25, Wien 19, dez. koresp. kĉl. bfl. Certe resp.

— Ni kolektive interŝ. PM kun komencantoj el la tuta mondo, escepte centr-eŭropaj ŝtatoj. Adr.: ALLE-grupo, Blumau ap. Felixdorf.

BULGARIO

K-do Sim. Dimitrov, str. Ŝar Planina, 56, Sofia, dez. interŝ. L, PK, PI, presaĵojn ktp. kĉl. Resp. garantiata.

ĈEĤOSLOVAKIO

K-do K. Krause, Warnsdorf, 1414/5, atentigas siajn koresp-antojn ekde 1. 9. 28 ne plu skribi laŭ supre citita adreso. Novan adr. mi publikigos.

FRANCIO

K-do Broutohoux, 96, av. de Versailles, Paris-16, dez. koresp. en nomo de lab. sportklubo de lignaĵ-laboristoj kun Sovetio pri Spartakiadoj. Tuj resp. Sama K-do koresp. serioze kun sindikatanoj meblo-laboristoj kĉl. Resp. garantiata nur al meblo-laboristoj.

— Al K-do S. Nercik, Stalingrad. — Ĉu vi ricevis miajn leteron k ĵurnalojn? Kial vi ne resp. al mi? — Liégeois, Orchies.

GERMANIO

— 3 K-doj dez. koresp. kĉl. por interŝ. ilustraĵojn. Adr.: R. Friedrich, Zirlau Nr. 7, Krs. Schweidnitz i Schl.

K-do Hubert Ackermann (23 j., masonisto), Dechenstr. 13, Streiffeld, Krs. Aachen, dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl. Resp. garantiata.

K-do Paul Singer (10 932), Rotebühlstr. 143, Stuttgart, dez. koresp. kun sovetiaj sportuloj (prefere funkciuloj) aŭ kun sportunuiĝoj.

K-do Kurt Mauritz, Juditterallee, 100, Königsberg i. Pr. (junkom.), pri ĉ. temoj, kĉl. L, PK, PM, il. gaz. Resp. garant.

K-do Max Wetzel, Theaterstr. 23, Glauchau i. Sa., dez. fruktedonan koresp-adon kun spertaj esp-istoj el ĉl.

K-dinoj Lina Fischer k Johanna Meinel, Pfarrlehen, Helen k Johanna Roth, Lindenstr., ĉiuj en Falkenstein i. Vogtl., dez. koresp. kĉl.

K-do Kurt Lischke, Goedeke-str. 19, Döllnitz b. Halle a. S., dez. koresp. kun Gek-doj PI, kĉl.

— Naturamika rondeto dez. koresp. kun samaj rondetoj aŭ kun genaturamikoj kĉl. PI, L. Adr.: "Naturamika Esperantorondeto", Hopfenberg 4-a, Naturfreundehaus, Ammendorf b. Halle a. S.

K-do Friedrich Helfers, Postschliessfach Nr. 165, Karlsruhe i. B., dez. ŝakludi L, PK, PI, kĉl.

K-do R. Tietze (ruĝfrontbatalanto), Pestalozzistr. 13, Lichtenstein-C. i. Sa., dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl. L, PI, il. gaz. Resp. garantiata.

— Kun ĉ. landoj k pri ĉ. temoj dez. koresp. K-dino Lenchen März, Jungbuschstr. 25, Mannheim.

Adresŝanĝo. — K-do Fritz Gersmann, Haus Hentrop, Hamm i. W. (Antaŭe en Bavario).

HISPANIO

— 2 K-doj dez. koresp. kun Gek-doj el ĉ. landoj. Adr.: Juan Farres, str. San Juan de Malta, 93-3°, Ia, Barcelona.

HUNGARIO

K-dino E. Kaszti, Pécs, Br. Banffi, Dezsöstr. 32, dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl. L, PK, PI.

SOVETIO

K-do Bazilo Sobolov, 3 Vladimirskij per. 5, kv. 3, Tver, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

Atentu Junularo! Lab. junularo de Serpuĥovo transdonas al junularo tutmonda saluton al Int. tago de la junularo, dez. ricevi salutojn el ĉl. al Int. tago de junularo. Adr.: Moskva gub., Serpuĥovo, ul. Krasnij Ugolok 453, al I. M. Korotkov.

K-do A. S. Bazurin, s. Vorsma, Niĵegordsk. gub., Pavlovsk. k., Gorŝeĉnaja ul. dom Zolotoviĥ, petas ĉ. K-dojn, kiuj havas libron: "Wucher, Duobla librotenado" vendi ĝin, aŭ komuniki, kie oni povas akiri ĝin.

— Niĵgubkom SESR (SEU), Teatralnaja pl. 6, kv. 11, Nijnij-Novgorod, petas ĉl. Gekdojn sendi diversspecajn esp-aĵojn (gaz., ĵurn., prospektojn, propagandilojn ktp.), por komence de sept., aranĝota esp. ekspozicio. Ni esperas, ke vi helpos nin en nia komuna laboro. Antaŭan dankon!

Adresŝanĝo. — K-do M. I. Ŝĉepkin (9712), Okrzemotdel, Lugansk (antaŭe en Kachary).

K-do S. Suetin, Pedteĥnikumo, Poĉinki, Niĵegorod. gub., dez. koresp. pri pedagogio k pentrarto kun seriozuloj, precipe kun Francio k Britio, L, PI. Resp. garantiata.

— Juna K-do E. Kraceviĉ, Ŝaumjana, 10, Batum (Kaŭkazo), dez. interŝ. L, PI, PM, kĉl. Gek-doj.

— Fervojistoj de fervojstacio, lokomotivejo k laborejo dez. koresp. pri div. temoj, PK, PI. Adr.: Moskvo, Kalanĉevskaja ul. Oktjabrskij vok. Slalinskie mast. jaĉejka esperantistov.

K-do Agr. A. Romanjuk, Andruszowka, Berdiczewskij okrug, Ukrainio, dez. koresp. pri agrikulturo k a temoj kĉl., gaz., ĵurn., PM. Resp. garantiata.

— Junsekcio de lab. klubo dez. koresp. pri junulara movado. Adr.: Naro-Fominsk, Mosk. gub., Esperanto-Kolektivo, n. 1.

— Meĥanika konstrufako Naro-Fominskiĥ f-k, dez. koresp. pri sindikataj k a temoj. Adr.: Naro-Fominsk, Mosk. gub., poĉtov. jasĉik. dla Esperantistov.

Adresŝanĝo. — K-do A. Ĥudincev, s. Keret, Louĥskij rajon, izlaĉitalnja, Karelio (antaŭe en Petrozavodsk).

— Rajona K-to de junkom. (VLRSM), dez. interligi siajn ĉelojn presistan, kooperativan, komunum-laboristan k a per esp. koresp-ado. Skribu multnombre! Adr.: Sebastopol, Rajkom VLRSM, Sovetskaja, 2.

K-do Pencik A., Kurort Grjazeleĉebnica, Slavjanskj, Donbas., dez. koresp. kĉl. L, PK.

K-do René Naville, Ŝtabnaja 2, "Zakvodĥoz", Tiflis, dez. koresp. pri div. temoj kĉl. L, PK, PI, precipe kun fraŭlinoj. Resp. garantiata.

K-do Igorj Miŝin, Komsomolskaja, 65, Sergiev, Mosk. gub., dez. koresp. kĉl. pri div. temoj, interŝ. L, PK, PI, esp-aĵojn, nacilingvajn librojn, gaz., ĵurn. Al ĉiuj akurate resp.

K-dino O. Guŝĉo, Dneprovsk, pereul. 9, Kremenĉug, dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl. L, PK, prefere kun plenaĝaj K-doj.

ATENTU!

La ĉefsiberiaj redakcioj de gazetoj k ĵurnaloj: "Juna Laboristo", "Juna Leninano" k "La nova Vilaĝo" serĉas gekorespondantojn pri junulara, virina k vilaĝana vivo. Abunde sendu materialojn. Rekompenco kaj respondo estas garantiata. Helpu varbi por nia movado! — Peras K-do Ŝ. Goldfeder, "Esperanto", **Barnaul,** Siberio (Sov.)

Gek-doj en la tuta mondo!

La 15-an de sept. 1928 nia klubo publike inaŭguros novan standardon. — Por montri ke la esperantista ĉeno ĉirkaŭas la tutan mondon bonvolu sendi salutleterojn al nia festo. Adr.: **Klubo Esp-ista de H:borgo.** A. Viberg, Värnamogatan 3, **Hälsingborg,** Svedio.

Nekrologo

En Petrozavodsk (Karelio, Sovetio) mortis 11-an de aŭgusto nia fervora K-do

Emilo V. Hallikainen

SAT-ano 56.

Li naskiĝis en Finnlando 31. 3. 1873. Li agis kiel instruisto, sed burĝa blanka teroro devigis lin forlasi tiun sferon. Post tio li estis redaktoro de laboristaj gazetoj. En Sovetio li alvenis en 1926, kaj ĉar li estis sperta lingvisto, li servis Sovetlandon kiel tradukisto. (4043)

ENHAVO:

	pago
El la urbo de nia VIII-a	395—96
Finkonkludoj de la VIII-a SAT-Kongreso	396—97
El la Sonneberga ludilindustrio	397
Faktoj sen komentoj	397
Johano Porter	398
Letero el Argentino	398
Tago el mia vivo	398
El la historio de l' Socialismo	399
Ĉu Religio estas privata afero?	399
Inter la montoj de Kaŭkazo	399
Tra Esperantio	400—02
Korespondado, Anoncoj	402

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)